Finiĝis laboro

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Finiĝis laboro kaj estas vespero
Necesas jam hejmen iri
Sed mi hodiaŭ promeni preferas
Delonge mi tion deziris.

Por tempo nelonga problemojn forgesi,
sidante sur benko sole.
Kaj ne rapidi ien sukcesi
iri kien mi volas.

Rf - I: Vagadi sencele ĝis nokta mallumo.
Agordi animon minore.
Kaj foliumi kiel albumon
foliojn de mia memoro.

Kaj mian doloron ne povos kuraci
eĉ tia ĉarna vespero.
Mi scias, mi scias, animtrankvilecon
mi trovos somere, somere.

Mi morgaŭ revenos al miaj problemoj,
sed dume mi estas libera.
Nerapidante duope promenas
mi kaj mia Espero.

Rf - I: